

*** *Esperanto malsupre* ***

Chers sociétaires

Vous avez reçu une convocation à notre Assemblée Générale, qui se tiendra le samedi 20 juin à 14 h, par visioconférence / téléphone et présence physique. Outre l'approbation du rapport financier et des tableaux financiers qui vous ont déjà été communiqués, l'assemblée générale devra se prononcer sur les trois points suivants :

Point 6 : Approbation des comptes de l'exercice 2019 et affectation du résultat 2019

Le bénéfice net après impôt étant de : 39 559,92 €

Conformément à nos statuts, ce résultat sera affecté ainsi :

- Affectation à la réserve légale 15% : 5 933,99 €
- Paiement des intérêts sur les parts B : 1 105,74 €
- Ristourne aux sociétaires : néant
- Augmentation du capital : néant
- Fonds de développement 32 520,19 €

Point 7 : Vote pour le passage de réserve statutaire en fond de développement

Par inadvertance, nous avons comptabilisé, au cours d'années antérieures, comme "report à nouveau" des sommes qui, selon nos statuts, auraient dû être affectées aux réserves statutaires, plus précisément : au fonds de développement destiné à l'extension de la Société.

La décision sera de réaffecter les 81 500 € enregistrés comme "report à nouveau" au "fonds de développement destiné à l'extension de la Société", en abrégé : "réserves statutaires".

Cette décision n'aura pas de conséquences pratiques, mais elle rendra le bilan plus simple et plus conforme à nos statuts. Il est nécessaire qu'elle soit formellement adoptée par l'Assemblée Générale.

Point 8 : Budget prévisionnel 2020

Du fait de la situation sanitaire, le budget qu'avait commencé à élaborer le Conseil d'Administration sur la base des années précédentes n'est plus en rapport avec la réalité. Tous les événements prévus ce printemps ont été annulés, bien que nous n'ayons pas cessé les travaux en cours. Sur la base des informations dont nous disposerons d'ici l'Assemblée Générale, nous vous soumettrons un budget possible, mais avec encore de grandes incertitudes sur le reste de l'année.

Le Conseil d'Administration

***** En esperanto *****

Karaj societanoj,

Vi jam ricevis kunvokilon al nia Jarkunveno, kiu okazos sabaton, la 20an de junio, je la 14a, virtuale kaj ĉeeste. Krom la ĝenerala akcepto de la financa raporto kaj de la financaj tabeloj, kiujn ni jam sendis al vi, la jarkunsido devos akcepti tri financajn rezoluciojn.

Tagorda punkto 6: Aprobo de la kontoj pri la jaro 2019 kaj imputo de la profito 2019

La kalkulita profito, post pago de imposto, estas: 39 559,92 €

Konforme al nia statuto, ni decidis enkalkuli ĝin kiel:

- Aldono al la laŭleĝa rezervo (15%) 5 933,99 €
- Rento pro societaj partoj B 1 105,74 €
- Kompenso al societanoj nulo
- Aldono al la kapitalo nulo
- Laŭstatutaj rezervoj 32 520,19 €

Tagorda punkto 7: Voĉdono por la transiro de statuta rezervo al disvolviĝa fonduso

Pro malatento en pli fruaj jaroj, ni enkalkulis kiel “novtransportorezulton” sumojn, kiuj laŭstatute devus esti aldonitaj al la laŭstatutaj rezervoj, pli precize: evoluiga fonduso cele al progresigo de la societo.

La decido estas transpigi la 81 500 € librotenitaj kiel “novtransportorezulto” al la “evoluiga fonduso cele al progresigo de la societo”, mallonge: “laŭstatutaj rezervoj”.

Tiu ĉi decido praktike ne havos konsekvencojn, sed ĝi igos la bilancon pli simpla kaj pli konforma al nia statuto. Ĝi nepre devos esti formale akceptita de la jarkunsido.

Tagorda punkto 8: Buĝeto 2020

Pro la sansituacio, la buĝeto, kiun komencis prilabori la Komitato surbaze de la antaŭaj jaroj, ne plu rilatas al la realeco. Ĉiuj printempaj aranĝoj estis nuligitaj, kvankam ni ne ĉesis la konstrulaborojn. Surbaze de la informoj, kiujn ni ricevos ĝis la jarkunsido, ni prezentos eblan buĝeton, kun ankoraŭ granda necerteco pri la cetero de la jaro.

La Administra Komitato